

Venontaj kunsidoj:

- Sa, la 20-an de junio
Ekskurso
- Lu, la 7-an de septembro
Elisabeth prelegos ...
- Lu, la 5-an de oktobro
M.-Antoinette prelegos ...

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Lunde, la 4-an de majo, je la 20-a ... « enrete »

**Karlota Blanc Maillard prelegos :
«Kiam, kial, kiel mi lernis esperanton?»**



Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Merkrede la 15-an de januaro
Pierre Delaunay
sentis sin tre malforta kaj decidis renkonti sian doktoron, kiu diagnozis renan infekton. Tuj la kuracisto sendis lin hospitalen, kie Pietro restis 3 semajnojn. Li nun restas siahejme.
(021 624 06 15)



Marde la 18-an de februaro
David Buhlmann
falas surtrotuare apud sia domo. Li rehejmeniĝis tuj kaj rimarkis kruran doloron. Lia fratino kondukis lin al la malsanulejo. Nenio rompiĝis. La kuracisto

proponis instali lin en Silvana dum 3 semajnoj. Li nun restas hejme. (021 624 36 38)



Vendrede la 21-an de februaro

Monique Golaz

falis en sia kuirejo nokte volante prepari teon. Ŝi marŝis ĉe Giulio - sametage - tute sangomakulita.

Post kontrolo en CHUV ŝi rehejmeniĝis. Dimanĉe Monique suferis de kapdoloroj kaj reiris al la malsanulejo, kie ŝi estis tuj kap-operaciita antaŭ resti en la intensiva prizorgejo. Post 2 semajnoj ŝi estis kondukita al Lavigny, kie ŝi ripozas.
(021 821 48 53 rekte)

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonaj silaboj:
A, AL, BA, BRAL, ĈO, ĈO, DO, DO, DRA, ĜI, ĜI, HI, JO,
KO, LA, LO, MI, PA, RA, RE, RO, ŜI, TA, TI, TOJ, ZO.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→) 1. Kolbaso kiu devenas el la Iberia duoninsulo; 3. Iĝi hidrato; 6. La ___ de Da Vinci (Dan Brown); 7. Konveksaĵo en objekto; 8. Bandaĉo, hordo; 9. Granda en vertikala; 10. Alpa montara sistemo kies plej alta punkto estas la Marmolada; 11. Aro da ŝipoj, konvojo.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓) 1. Dolĉa manĝaĵo farita el kakao; 2. ___ matene, ploro vespere; 3. Japana ujo, ordinaro ceramika; 4. Ŝoso de pli maljuna planto; 5. Dependenta teritorio de Britio en Suda Eŭropo; 7. La havonto de ĝrita papero aŭ sumo (pluralo); 8. Havi koran aŭ seksan inklino al iu; 9. Rilata al alpoj.

SILABO KROKODILO

DO	LO	MI	TOJ	HI	DR	ĜI
LA	DO	V	RA	ĜI	BA	ĜI
KO	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI
LA	DO	ĈO	BA	HI	DRA	ĜI

Karlo de Edmond Privat

dekkvina ĉapitro: La sekreto de Karlo

Ĉiudimanĉe la familio Davis iris al la ĉefpreĝejo, matene je duono post la deka. Ĝi estis tre malnova katedra preĝejo, ekkonstruita en la centjaro de la imperiestro Karlo Granda.

Dum la orgeno eksonis laŭtege, ĉe la komenco de l' diservo, Karlo sidiĝinte apud siaj gepatroj okule serĉadis iun sur la benkoj antaŭ si. Li estis maltrankvila ĝis li rekons blondan hararon kun blua rubando, kiu ĉiudimanĉe aperis tie. Lumigata de sunradio falinta tra la koloraj vitraĵoj, la blonda hararo brilis kvazaŭ oro inter la nigriĝintaj kolonoj de l' antikva templo. Tiu vidaĵo trankviligis la animon de Karlo, kaj post la preĝoj li ne movis plu siajn okulojn dum la tuta predikado de l' pastro. Post la diservo Karlo kutime zorgis por vidi la junulinon elirantan; kaj ĉiufoje li konvinkiĝis, ke ŝi havas belege blujajn okulojn.

Iam promenante tra l' artmuzeo kun amiko, li vidis ŝin admire starantan antaŭ pentraĵo de itala majstro. Li kompreneble haltis antaŭ la sama. Ŝi tre ruĝiĝis; sed de

tiu tempo, ĉiudimanĉe ili ofte ekrigardis unu la alian elirante el la ĉefpreĝejo. Ŝi ĝenerale estis sola kun sia patrino, sed kelkfoje ili salutis kaj alparolis alian sinjorinon, kiu eliris el preĝejo kun kvar gefiloj. Karlo iam aŭdis ŝin diri al ili: "Vi do venos ludi en la Nacian Parkon hodiaŭ posttagmeze, ĉu ne?"

Post iom da pripensado Karlo decidis, ke li ankaŭ iros al la parko posttagmeze. Tie li havis mirindan ŝancon, ĉar promenante apud la ludkampo, li dufoje havis okazon redoni al ŝi pilkon falintan sur la vojon aŭ perditan sub arboj. Ŝia rideto kaj danko lin strange konfuzis. La postan dimanĉon, li sekvis ŝin de malproksime por vidi, kie ŝi loĝas. Tio estis ekster la urbo sur strato bordita de arboj kaj ĝardenoj. Ŝi eniris en kastelforman dometon kun belega florigardeno plena je rozoj.


Karlo jam ofte rimarkis tiun domon antaŭe, sed ŝajnis al li, ke ĝis nun ĝi

ĉiam estis fermita; kaj li kredis, ke ĝi estas neluita. Kredeble ŝia familio ĵus luis aŭ aĉetis la domon.

De tiam Karlo ofte vagadis ĉirkaŭ tiu loko, esperante ŝin ŝance ekvidi. Unu vesperon li vidis ŝin promeni kun ŝia patro en la ĝardeno. Alian fojon li aŭdis ŝin kanti tra malfermita fenestro. Tio lin feliĉigis por multaj tagoj. Jam lia fratino kaj liaj kolegoj ĉe la gimnazio multe miris pri lia ofta revemeco.

Unu tagon li trovis ŝian domon tute fermita. Teruran baton li ricevis en la koro. Reveninte la morgaŭan tagon li same vidis. Ŝi eble forveturis kun la tuta familio. Sed kien? En la ĝardeno kelkaj nigraj birdoj pepante interbataletis. Karlo jam kredis, ke lia tuta vivo estas ruinigita.

Li decidis diri al Janko sian sekreton kaj peti lian helpon.



Intervjuo de Marie-Antoinette Sunier, Fidela membro de LES

(Fare de Francisko)

- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.

Mi naskiĝis en la regiono de Gruyères la 5-an de majo 1941. Kiam mi 17-jaraĝis mi ekstudis en Romanshorn (TG) por iĝi helpanta flegistino kaj flegistino en Sion (VS). Mi deziris vojaĝi al Sud-Ameriko. Tiam Knud eniris mian vivon en 1966 kaj restigis min Svislande. Mi ankoraŭ sekvis kurson por iĝi akuŝistino.

- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?

Knud kaj mi membras kun Karlota en grupo de promengvidantoj en Montreux. Ŝi pasiege parolis al ni pri esperanto. Tiu ideo de internacieco tre plaĉas al ni.

- Kiam vi decidis studi esperanton?

Viktor, la hungara eksamiko de Karlota instruis al ni la bazojn de ĝi.

- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?

Niaj familianoj kaj geamikoj ridetis pri nia decido; ili sciis, ke ni, ekde ĉiam, vivas specialaĵojn. Nun pli kaj pli ili komprenetas, tamen ne volas studi esperanton.

- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?

En Montreux konatuloj konsentis aliĝi al nia unua instruado starigita kun Karlota.

- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?

Ni partoprenis du italajn kongresojn: Mazara del Vallo (Sicilio) + Frascati apud Romo kaj 2 UK-ojn: Lillo (Francio) + Seulo (Koreio) post trajna vojaĝo tra Siberio.

